


BULGARA

7 • 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





LJUDMILA JIVKOVA

1942—1981

Je la 21-a de julio k. j. forpasis 39-jara LJUDMILA TODOROVA JIVKOVA, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio, prezidanto de la Komitato pri Kulturo kaj membro de la Parlamento.

La frua morto forprenis el niaj vicoj unu el la plej elstaraj politikaj personecoj, agantino pri bulgara socialisma kulturo, flama patriotino kaj internaciistino, dediĉinta sian tutan konscian vivon al la triumfo de la komunisma idealo.

LJUDMILA JIVKOVA estas naskita la 26an de julio 1942 en Sofio. Ŝi membriĝis en la Dimitrova Junkomunista Unuiĝo en 1956 kaj en BKP en 1967. Finstudinte la Sofian Universitaton «Kliment Ohridski», ŝi laboris kiel supera scienclaboristo en la Instituto pri Balkanistiko ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj kaj specialiĝis pri historio de la artoj en la Moskva Universitato.

La sciencesplora faro de LJUDMILA JIVKOVA estas ege riĉa: vivo da monografioj, studoj kaj artikoloj, publikigitaj en nia lando kaj ankaŭ eksterlande, kiuj estas originala kontribuo al la tutmonda historia scienco, arto kaj kulturo. Pro siaj verkoj kaj scienca agado ŝi estis distingita per la alta titolo «Merita aganto de la kulturo».

Kiel prezidanto de la Komitato pri Kulturo, LJUDMILA JIVKOVA sukcese realigis la planon pri starigo de nacia komplekso «Arta kreado, kultura agado kaj amaskomunikiloj» kaj longdaŭra programo pri harmonia disvolvigo de la individuo. Ŝia estas la ideo kaj realigo de la internacia aranĝo Infana Asembleo «Standardo de la Paco» — jam tutmonde konata kaj alte pritaksata.

LJUDMILA JIVKOVA estis prezidanto de la Nacia Kunordiga Komitato pri celebrado de 1300-a datreveno de la fondiĝo de la Bulgara Ŝtato kaj faris multon por la popularigo de tiu grava historia kaj soci-kultura evento.

La morto de LJUDMILA JIVKOVA estas grava kaj kara perdo por la Bulgara Komunista Partio kaj por la tuta bulgara popolo.

Ŝia vivo kaj faro estas inspirantaj ekzemploj por la laboruloj kaj speciale por la juna generacio de socialisma Bulgario.

La tuta bulgara popolo kliniĝas antaŭ la korprestaĵoj de LJUDMILA JIVKOVA kaj esprimas sian profundan kondolencan al ŝiaj parencoj.

La bulgaraj esperantisoj neniam forgesos la atenton kaj la zorgon de k-dino JIVKOVA al la esperantista agado en nia lando. En 1978 ŝi estis alta protektanto de la 34a Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en Veliko Tŕrnovo.

Estu ĉiam hela ŝia memoro!



LA FONTO DE LA VIVO

Baldau oni festos la 90-jaran jubileon de la fondo de Bulgara Komunista Partio. Tiu ĉi jubileo koincidas kun la 125a naskiĝtago de ĝia fondinto Dimităr Blagoev kaj kun la 25a datreveno de la Aprila Plenkunsido, kiu plenumis gravegan rolon en la restarigo de la Leninaj normoj de partia vivo kaj por kreskigo de la produktivaj fortoj de la lando.

Fondita en la fino de la deknaŭa jarcento, BKP estas la unua marksisma partio en la Balkana Duoninsulo. Ĝia fondiĝo estigis grava vojonmontrilo por la laborista movado en nia lando. La longa vojo, trairita dum 90 jaroj, estas ekzemplo de sindona servo al la laborista klaso kaj la laborpopolo — senĉesa batalo por venigo de la grandaj socialismaj idealoj — eterna libereco, sociala egaleco kaj justeco.

Sub la gvidado de BKP dum 20 jaroj nia popolo kurage batalis kontraŭ la faŝismo. Ĝi organizis la Septembran Ribelon en 1923 kaj la trijaran sangan partizanan batalon kontraŭ la monarko-faŝisma diktaturo 1941—1944. Apogante sin sur la antaŭenmarŝo de la sovetunia armeo, la Partio organizis nian popolon sub la standardo de Patrolanda Fronto kaj en septembro 1944 alvokis la laboramasojn al ribelo, kiu sukcesis renversi la vasalojn de Hitler.

Dimităr Blagoev forĝis la revoluciajn tradiciojn de la partio, kiuj poste sub la gvido de Georgi Dimitrov faciligis ĝin transiri al nov-tipa partio — partio de Lenina modelo.

Armita per la instruoj de Marks kaj Lenin, BKP sukcese forigis el siaj vicoj la portantojn de dekstraj kaj maldekstraj doktrinoj kaj kondukis nian popolon al venko de la socialisma revolucio.

Preninte en siajn manojn la direktilojn de Bulgario, Georgi Dimitrov en la historia V kongreso de BKP skizis la ĝeneralan vojon al konstruo de la fundamento de socialismo. Li testamentis al nia popolo iri ŝultron ĉe ŝultra kun la granda sovetunia popolo, kiu montras al tuta mondo la vojon al sociala progreso. Lian testamenton plenumis la Centra Komitato de la Partio frunte kun kamarado Todor Jivkov, kiu senpere gvidis la okazintan en aprilo 1956 historian plenkunsidon de BKP.

La XII kongreso de la Partio skizis la pluan vojon al konstruado de la matura socialismo, kiam iom post iom ekestos la kondiĉoj por tute nova strukturo de la socio — unuiĝo de laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj.

En sia ekstera politiko BKP plenforte subtenas la pacprogramon de la Komunista Partio de Sovet-Unio, kiu celas forigon de la milito el la vivo de la landoj kaj ekregon de tutmonda paco.

BKP sukcesplene plenumas sian historian mision, ĉar ĝi aplikas la marks-leninan ideologion, ĉar ĝi apogas sin sur la proleta internaciismo kaj estas fidela aliancano de KPSU kaj de la ceteraj komunistaj partioj.


La devizo de la Partio estas: **Ĉion je la nomo de la homo, ĉion por la bono de la homo.** Tiu ĉi devizo montras, ke ĉio, kion partoprenas la Partio, celas la bonstaton de la homoj. Ĝi estas vera fonto de la vivo.

BEA lernas el la decidoj de la XII kongreso de BKP, ĉar ili helpas al nia asocio perfektigi sian laboron.

Gloron al la Partio — avangardo de nia popolo!

LIA FARO ESTAS SENMORTA

(125^a JAROJN DE LA NASKIĜO DE DIMITAR BLAGOEV)



„La batalo por socialismo nuntempe estiĝas reganta forto en la mondo. La mondo eniras epokon de sociala revolucio kaj triumfo de la socialismo. ... La socialisma revolucio konkeros la tutan mondon. ...“

DIMITAR BLAGOEV

Rajte oni nomas lin patriarko de la socialismo en Bulgario kaj en la tuta Balkana Duoninsulo. Dimitar Blagoev fondis la klasbatalan marksistan partion de la bulgara laborista klaso. Li estis ĝia gvidanto dum pli ol tri jardekoj, hardigis ĝin en klasbataloj, edukis ĝin en spirito de revolucia proleta internaciismo. D. Blagoev havigis al la Partio fortan ideologian batalilon — marksisma filozofio kaj estetiko, marksisma analizo de la ekonomikaj eventoj. Post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio la firmaj revoluciaj marksistaj fortoj fondis la III Komunistan Internacion. La Bulgara Laborista Socialdemokrata Partio (strikta) aliĝis kunfonde al la Internacio kiel tuto, sen iaj ajn skuoj. En sia sekva kongreso ĝi pro-

klamis sin Bulgara Komunista Partio (BKP) kaj akceptis koncernan programon.

La vojo estis malfacila, nur spirite forta homo povis marŝi ĝin.

Dimitar Blagoev naskiĝis la 14an de junio 1856 en malriĉa kamparana familio en v. Zagoriĉene, Makedonio. De sia infanaĝo li strebis ricevi pli da scioj. Blagoev finis elementan lernejon en la naskiĝvilaĝo kaj en 1871 veturis al Konstantinopolo, la ĉefurbo de la Otomana Imperio, por vivteni sin. Finfine li forlasis la laboraĵojn ĉe la piedoj de la metiestro kaj eklernis en la bulgara lernejo, kie instruis la famekonata Petko Slavejkov — publicisto kaj poeto, batalanto por bulgara eklezia sendependeco. Kiam en la postaj jaroj la instruisto translokiĝis sinsekve al Odrin, Gabrovo kaj Stara Zagora por instrui en tiuj urboj, Dimitar Blagoev sekvis lin.

La rusajn soldatojn-liberigantojn kaj la bulgarajn volontulojn Blagoev renkontis en julio 1877 en Stara Zagora kaj helpis al ili. Kiam post tritagaj bataloj la soldatoj retiriĝis al montopinto Sipka en Balkan-montaro, li kune kun granda parto de la loĝantaro forlasis la minacitan urbon kaj serĉis rifuĝejon trans la Balkanoj. Li restis en u. Sviŝtov kaj fariĝis tabaklaboristo. En 1879 li sukcesis veturi al Rusio por daŭrigi la studadon — unue en Odeso, poste en Peterburgo (Leningrado), kie li studis juron en la tiea universitato.

Jam lernanto, lin okupis la problemoj pri la esenco de l'vivo. Tiu problemoj okupis lin ankaŭ en Rusio. Li ekkonis iujn verkojn de F. Lasal kaj la unuan volumon de „La Kapitalo“ de K. Marks. Blagoev firme decidis ligi sian vivon kun la batalo de la laborista klaso por pli justa sociordo. En la fino de 1883 li fondis eksterleĝe la unuan socialdemokratikan organizaĵon en Rusio, konatan kiel „La grupo de Blagoev“.

Tuj post la reveno al Bulgario Blagoev ekpropagandis la socialismajn ideojn inter la progresema intelektularo, eldonis marksisttendencan ĵurnalon (baldaŭ malpermesotan de la registaro). Poste li agadis por profesia unuiĝo de la instruistaro, eldonis du broŝurojn, sed evidentigis, ke la bazo por socialisma propagando ankoraŭ ne estis preta. Analizinte

la ekonomian situacion de la lando, en 1891 Blagoev konstatis, ke kune kun la enpenetro de la kapitalismo en Bulgarien la laborista klaso formiĝis kaj venis tempo por fondiĝo de bulgara socialdemokrata partio. Dank'al liaj klopodoj en aŭgusto 1891 sur la historia montopinto Buzluĝa okazis la fonda kongreso de la partio. Nur tri monatojn post la kongreso aperis la fundamenta verko de Blagoev „Kio estas socialismo kaj ĉu ĝi havas grundon ĉe ni?“ En la sekva 1892 aperis alia lia libro „La socialismo kaj la taskoj de la bulgara laborista klaso“, ekaperis ankaŭ semajna partia gazeto, redaktata de Blagoev.

En la partiaj periodaĵoj, aparte en la fondita kaj redaktata de Blagoev partia teoria organo „Novo Vreme“ (Nova Tempo), en deko da broŝuroj li provizis la partion per fundamentaj marksismaj verkoj, utiligataj en la ĉiutaga partia agado. Multfoje li estis elektata deputito en la Parlamento kaj en la Komunuma Konsilantaro de Sofio, kie Blagoev insiste interpretis kaj defendis la interesojn de la laboristoj kaj la ceteraj laboruloj.

Dimităr Blagoev vigle agadis en la internacia laborista movado, partoprenis internaciajn socialistajn kongresojn kaj konferencojn, plenforte batalis kontraŭ provoj ennestigi oportunismon kaj reformismon en la vicojn de la Dua Internacio.

Li forpasis la 7an de majo 1924, kiam la lando suferis sub la kruela faŝisma teroro, post la frakaso de la glora Septembra Antifaŝisma Ribelo en 1923.

—

NIA HEROA ANĜELO

La sofia E-societo „M. Gorki“ organizis memorkunvenon dediĉe al la neforgesebla aktivo de la bulgara E-movado Angel Petkov Ivanov, populara sub la esperantigita nomo Angelo.

Prelegon pri lia vivo kaj agado faris Nikola Aleksiev, kamarado, amiko kaj kunbatalanto de Angelo. La preleginto verve prezentis la vivobildon, la esperantistan kaj sindikatan agadon de la heroo. Jen koncize la plej gravaj punktoj de la multflanka laboro de Angelo dum lia tre mallonga vivo — apenaŭ 32-jara: ano de Centra Komitato de Laborista E-Asocio, redaktoro de ties semajna organo „Mejdunaroden Rabselkor“ (Internacia Laborist-Kampanara Korespondanto), respondeca redaktoro de la centra sindikata organo „Edinstvo“ (Unueco), kunlaboranto de la malpermesitaj Sendependaj Sindikatoj kaj la Bulgara Komunista Partio pri ties stencilitaj eldonaĵoj, respondeculo pri sekretaj loĝejoj de la persekutataj elstaraj funkciuloj de BKP Trajčo Kostov, Stanke Dimitrov k. a. Kvankam

La ĝolosan faron de Dimităr Blagoev daŭrigis multaj liaj fidelaj disĉiploj kaj kunlaborantoj frunte kun Georgi Dimitrov. La Bulgara Komunista Partio evoluis kiel partio de marksisma-leninisma modelo, kapabla gvidi la batalon de la bulgara popolo por forigo de la kapitalismo kaj por konstruado de nova pli justa sociordo — la socialismo. Logika kaj natura sekvo estis la popola venko en la socialisma revolucio je la 9a de septembro 1944.



X kongreso de BLSDP* — Ruse, 1903

Dimităr Blagoev — nomata kun estimo kaj amo de la laboruloj Avo, restos por ĉiam en la historio de la Bulgara Komunista Partio kaj en la memoro de la popolo.

Kr. KARUCIN

*BLSDP — Bulgara Laborista Socialdemokrata Partio

kun verdikto pri severa malliberigo, la serĉata de la polico Anĝelo partoprenis kuraĝe en la agado de la sofia kaj landa E-movado. Arestita en 1941 kun multaj aliaj kamaradoj, inter kiuj ankaŭ la E-poeto Asen Grigorov, li estis kruele torturita en la Policedirekcio kaj por ne morti en la policejo oni rapide ekspedis lin al la malliberejo. . . Tiel martire li forpasis, sed lasis al ni — la bulgaraj esperantistoj — brilan ekzemplon de patriotismo kaj internaciismo.

Rememorojn pri Anĝelo rakontis liaj kunbatalantoj kaj E-amikoj Ivan Keremidĉiev — Esperov, Violin Oljanov, d-ro Stojan Moraresku, lia samurbano kaj kunlernanto. Oni sekvis kun granda atento la parolojn de ĉiuj E-veteranoj. Interesan momenton tuŝis V. Oljanov, sciigante pri vizito al Anĝelo en la mallibereja malsanulejo. La konsumita kaj morte pala Anĝelo trovis fortojn rideti kaj ŝerci kun siaj vizitantoj! Nur post du horoj li forpasis. . . Tio okazis la 13an de junio 1941.

N. A.



BULGARIO — 13 JARCENTOJN DE VENKOJ, SUFEROJ, KAJ GLORO...

Paroli pri la historio de urbo Ŝumen signifus paroli pri la historio de la bulgara ŝtato, travivinta dum ties 13-jarcenta ekzistado glorajn venkojn, suferojn kaj disfloron. De sur la montoj kaj rokegoj, ĉirkaŭantaj la urbon, abundaj je restaĵoj de la antikva pasinteco, la vizitanton rigardas la ombroj de legendaj bulgaraj regantoj kaj naciaj herooj, kreintaj la gloran historion de Bulgario. En la proksimaj al Ŝumen regionoj troviĝas la ruinoj de la unuaj bulgaraj ĉefurboj Pliska kaj Veliki Preslav, samkiel la mondfama barielefo de la Ĉeval-rajdanto (705—707), ĉizita sur la rokegoj apud Madara de nekonata antikva majstro glorie alj la famaj bulgaraj regantoj Tervel, Kormisoŝ kaj Omurtag.

Urbo kun riĉaj revoluciaj kaj kulturklerigaj tradicioj, Ŝumen estis lulilo de unu el la apostoloj de la Aprila Ribelo kontraŭ la otomana jugo en 1876 — Panajot Volov, de eminentaj agantoj de la bulgara scienco literaturo kaj arto: la verkistoj Sava Dobroplodni, Dobri Vojnikov, Vasil Drumev, la sciencistoj Metodi Popov, Bojan Penev, skulptisto Andrej Stojanov, muzikisto Veselin Stojanov kaj multaj aliaj.

Dum la multjaraj klasbataloj de la bulgara laboristaro Ŝumen estis unu el la centroj de la bulgara socialisma kaj komunisma agado. La fondinto de la Bulgara socialdemokrata partio Dimităr Blagoev iniciatis la unuan socialisman presejon „Osnova“ (Fundamento), en kiu oni presis la unuan partian eldonaĵon „Den“ („Tago“). La faron de Dimităr Blagoev (nomata — Avo) kaj de lia kunlaborantino kaj edzino Vela Blagoeva sekvis centoj da samideanoj — socialistoj kaj komunistoj, kiuj sindone batalis kontraŭ kapitalismo kaj faŝismo por la liberigo de la laborista klaso, por feliĉa nuntempo de la tuta bulgara popolo.



El la labor-kunsidoj de la konferenco

Hodiaŭ Sumen estas unu el la prosperantaj distriktoj centroj de socialisma Bulgario, kun disvolviginta industrio kaj agraraj kompleksoj, en kies regiono estas centoj da elementaj, mezaj kaj superaj lernejoj, leĝejoj, bibliotekoj, teatroj, kinejoj kaj multaj aliaj scienckulturaj institucioj.

Baldaŭ en Sumen kaj en ĝia regiono okazos la solena festado de la 13-jarcenta jubileo de la fondiĝo de la bulgara ŝtato.

Granda kontribuo de la bulgaraj esperantistoj al la tutpopola festado de tiu jubileo estis la Internacia Sciencpraktika Esperantista Konferenco „BULGARIO — 1300“, organizita la 29—31 de majo k. j. en la urboj Sumen kaj Preslav de Bulgara Esperantista Asocio kunlaborante kun la Distrikta Konsilio pri Kulturo, de DE de BEA kaj la Direkcio „Kultur-Historia Heredaĵo“ — Sumen.

Tiun jubilean solenan arangon de BEA partoprenis ankaŭ esperantistoj el Sovetunio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj specialaj delegitaroj el la ĝemelaj kun Sumen urboj Magdeburg (GDR) kaj Debrecen (Hungario).

La solena malfermo de la konferenco okazis en la koncerta halo de la popola leĝejo „Dobri Vojnikov“ en Sumen. Inter la oficialaj personoj estis Stefan Penev — prezidanto de la Distrikta Konsilio pri Kulturo kaj Petar Todorov — vicprezidanto de BEA kaj estrarano pri faka agado de UEA.

Enkondukan paroladon direktis al la partoprenantoj Veska Dragostinova, prezidantino de DE de BEA. Varmajn salutojn prezentis ankaŭ Stefan Petrov kaj Petar Todorov. Kun atento kaj vigla intereso oni akceptis la raporton „1300-jariĝo de Bulgario — nacia fiero por ĉiu bulgaro“ de la kandidato de historiaj sciencoj Krum Krumov. La sovetia ĵurnalisto Georgij Korotkeviĉ — membro de la Estraro de ASE, parolis pri la signifo de E-o por la paco sur la planedo.

La sekvan tagon la konferenco daŭrigis sian laboron en leĝejo „Razvitie“ (Evoluo) en urbo Preslav. Tutkore salutis la partoprenantojn Dobri Kulev, prezidanto de la Komunuma Konsilio pri Kulturo. La raportoj „Pliska en la lumo de la lastaj arkeologiaj esploroj“ de Pavel Georgiev, „Madara kaj la Ĉevalrajdanto de Madara“ de Raŝev, „Veliki Preslav“ de Stojĉo Bonev kaj „La ŝtataj signoj de la regantoj de Pliska kaj Preslav“ de Ivan Jordanov — ĉiuj el la Filio de la Arkeologia Instituto ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj en Sumen, malkovris gravajn momentojn el la historio de la bulgara popolo dum la periodo de la formiĝo de la ŝtata institucio en la VII kaj VIII jarcentoj. Intereson provokis ankaŭ la raporto de d-ro Ljudmil Conov „Bulgara medicino dum mezepoko“, samkiel la projekciita filmo „La trezoro de Preslav“.

En amika, agrabla etoso la partoprenintoj en la konferenco ekskursis al la antikva ĉefurboj Pliska, Veliki Preslav kaj la historia loko Madara.

En la tria tago ili denove estis en Sumen. Multajn meditojn elvokis ĉe la ĉeestantoj la raportoj „La antikva historio de Sumen laŭ la arkeologiaj esploroj“ de la merita aganto de la kulturo kaj ĉefscienca kunlaboranto Vera Antonova, „Sumen kaj la bulgara Renesanco“ de la scienca kunlaboranto Dorotea Georgieva, kaj „La Kultur-historia heredaĵo de Sumen kaj la aspekto de nuntempa Sumen-distrikto“ de Petko Todorov, vicprezidanto de DE de BEA — Sumen. La plejparto el la raportoj estis ilustritaj per diapozitivoj, kiuj bone evidencigis gravajn detalojn de la arkeologiaj esploroj en la regiono. Projekciita estis ankaŭ la filmo „Urbo mia, fiero mia“, majstre kreita de la reprezenta amatora kinoklubo „Madara Ĉevalrajdanto“ en Sumen.

Agrabla paŭzo inter la kunsidoj de la konferenco estis la vizito al la antikva fortikaĵo kaj al la monumento-memorejo „1300 jarojn Bulgario“ sur unu el la montetoj apud Sumen.

En la lasta kunsido prenis la parolon multaj esperantistoj. Oni atente aŭskultis la eldirojn de la delegitoj el Magdeburg — Günther Endler (GDR) kaj el Debrecen Tibor Papp (Hungario), de Rudolf Burmeister el Karl-Marx-Stadt (GDR) kaj de aliaj e-istoj el la frataj socialismaj landoj. Estis traŭgita salut-parolo de la ĝemeligita kun Sumen ĉeĥoslovaka urbo Usti nad Labem.

En sia konkludparolo Violin Oljanov, membro de la Buroo de la Centra Estraro de BEA alte pritaksis la laboron de la Konferenco kaj ties bonan organizadon.

En la oficiala akcepto por la eksterlandaj geesperantistoj fare de la prezidanto de la Komunuma Popola Konsilantaro Aleksandăr Uzunov oni konigis al la gastoj la soci-ekonomian kaj kulturklerigan disvolviĝon de Sumen kaj ties distrikto.

Dum la tagoj de la konferenco ni sukcesis renkontiĝi kun iuj el la gastoj kaj interparoli pri iliaj impresoj de tiu arango.

GEORGIJ KOROTKEVIĈ, USSR, membro de la Estraro de ASE:

Pri la proksimiĝanta glora datreveno — 1300 jarojn de la fondiĝo de la bulgara ŝtato — ni scias jam delonge. Bulgario vere eniris niajn korojn, niajn spiritojn pere de la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov, per la pentraĵoj de nia rusa pentristo V. V. Vereŝagin, per la vortoj „Pleven“ kaj „Sipka“, per kantoj kaj versaĵoj. Ni estas tre dankemaj al la Estraro de BEA kaj al ŝumenaj esperantistoj pro la invito partopreni tiun sciencan konferencon, dediĉitan al la glora jubileo. Dum tiuj tri



Partoprenintoj en la Sciencpraktika Konferenco „Bulgario — 1300“ en Ŝumen

tagoj ni multon aŭdis, multon vidis. Ĉio faris al ni grandan impreson. La prelegoj dum la konferenco, ĉio, kion ni vidis en la Etnografia Muzeo, permesis al ni ĵeti rigardon al la pasinteco. La renkontiĝo kun la prezidanto de la Komunuma Konsilantaro k-do Uzunov donis al ni aldonan informon pri la nuntempo de tiu grava distrikta centro de socialisma Bulgario. Ni ankoraŭfoje konvinkiĝis pri la malfacila vojo de la bulgara popolo, kiu donis al la homaro multajn talentulojn, la cirilan alfabeton al la slava gento kaj kreis altvaloran literaturon kaj arton.

Ni ne forgesos la tagojn en Ŝumen kaj reveninte hejmen ni faros ĉion eblan por sciigi al niaj amikoj pri la agrablaj, utilaj renkontoj kaj interparoloj. Koran dankon pro via afabla gastamo!

RUDOLF BURMEISTER, Karl-Marx-Stadt, GDR:

Niaj impresoj de la konferenco estas plej bonaj. Jam kelkfoje ni vizitis vian landon, sed nur nun ni havis eblecon konatiĝi kun la regiono de historiaj Pliska kaj Madara. Nia nuna vizito profundigis nian scion pri la riĉa historio de via lando. Kun granda plezuro ni revidis vicon da malnovaj geamikoj, kun kiuj ni konatiĝis jam en 1960 en Veliko Tŕnovo, en 1962 en Burgas kaj en 1964 en Plevn. Denove ni spertis la famekonatan gastamon de bulgaroj kaj ilian helpemon. La organi-

zantoj de tiu simpozio nepre meritas grandegan laŭdon, ĉar suverene ili regis (el organiza vidpunkto) la tutan aranĝon.

D-RO BELA MESZAROS,
TIBOR PAPP, Debrecen, Hungario:

— Kun ĝojo ni akceptis la inviton de Ŝumen — la bulgara ĝemelurbo de Debrecen. Jam tuj post nia alveno ni konvinkiĝis, ke la organizado estas je alta nivelo. Agradeble estis sperti, ke en Bulgario la Internacia Lingvo Esperanto penetras pli kaj pli en la sciencon kaj la teknikon kaj ke tiun procedon vigle subtenas ankaŭ la Bulgara Komunista Partio. Tiu ĉi subteno donas reputacion al la bulgaraj esperantistoj. Ni ŝatus, ke tiu modela agado estu sekvata de aliaj socialismaj landoj.

Dum nia kelktaga restado en la belegra urbo Ŝumen kaj ĝia distrikto ni kortuŝe konstatis, ke la bulgara popolo altestime gardas sian pasintecon, similan al tiu de la hungara popolo. Por ni estis emocie renkonti la nomon de Lajos Kossuth (Lajoŝ Koŝut) — la elstara gvidanto de la hungara revolucio kaj liberiga batalo en 1848—49.

Ni, la gastantaj hungaroj, ne sciis, ke Kossuth kaj liaj revoluciaj kamaradoj-elmigrintoj efike influis al la revolucia vekigo de la bulgara popolo.

Ŝumen—Sofio,
majo, 1981

DONČO ĤITROV

BOTEV-RECITALO EN ESPERANTO

Bonega iniciato: recitalo de Botev-poezio kaj oratora konkurso pri Botev en E-o! Ĝi apartenas al la Distrikta Estraro de BEA en Vraca kaj tre bone efektiviĝis dank'al la helpo de Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio en Vraca kaj Centra Estraro de BEA.

La ideo: la ĉi-jara recitalo estu eksperimenta — do nur en nacia kadro kaj kun partopreno de ne pli ol 100 personoj. Sed la 31an de majo ĉe la malfermo en la Distrikta Junulara Domo en Vraca ĉeestis pli ol 150 personoj — junpioniroj, mezlernejanoj, junuloj kaj civitanoj — el ĉiuj anguloj de la lando! Kaj la duono de ili sinsekve aperis sur la scenejo kiel plenumantoj de Botev-verkoj — individue kaj kolektive. En daŭro de pli ol tri horoj sub la portreto de la granda bulgara poeto kaj lia verso „Ja kiu falas por la libero, mortas neniam. . .“ sonis la emociigaj poemoj „Haĝi Dimităr“, „La pendumo de Vasil Levski“, „Elegio“, „Al mia patrino“, „Al la frato“, „Mia preĝo“, „Hajdukoj“, „Salmo ludas sur herbejo“ kaj multaj el la deklamantoj estis bonaj, aliaj — tre bonaj kaj triaj — bonegaj — kaj la ĵurio, konsistanta el Kunĉo Vălev, Radoslav Tričkov kaj Kiril Velkov,

notis tion per meritaj premioj — monaj, libraj, honordiplomaj.

Ekde la sekva jaro la recitalo fariĝos internacia. Ĉiu popolo havas sian Botev kaj Botev-poetojn, tial la eksterlandaj gastoj povus reciti ne nur Botev-verkojn, sed ankaŭ pecojn el sia nacia revolucia poezio.

Botev-recitalo estas vere trafa kaj perspektiva arango kun granda ideo-eduka forto. Per sia flama revolucia poezio, per sia amo al libereco kaj socia justeco, al la suferantaj kaj senrajtigataj popolamasoj Ĥristo Botev estas eksterordinare konvena standardo de simila recitalo. Por la bulgara popolo li estas supro de la nacia poezio, mobilizanta ekzemplo kaj eterna fonto de pura inspiro. Sed Botev apartenas ne nur al la bulgara popolo. Li apartenas al la tuta progresema homaro, batalanta por nova vivo, por popola feliĉo. Sankta devo de la bulgaraj esperantistoj estas popularigi laŭ ĉiuj eblaj manieroj la faron, la poezion kaj la ideojn de Botev kiel revoluciulo, patrioto kaj internaciisto.

La recitalo en Vraca en la antaŭvespero de la 2a de junio, kiam la genia poeto pereis trafita de malamika kuglo en la Vraca-



La konkursanoj en la Botev-recitalo

Balkano frunte al taĉmento de patriotoj, estas ankoraŭ unu bona ebleco popularigi lin, radiigi, korojn kaj animojn per lia fajra poezio kaj senmortaj ideoj.

Mi opinias, ke la amplitudo de la recitalo devas plivastigi. En ĝi devas esti ne nur poezio, sed ankaŭ prozo de Botev, samkiel Botev-kantoj. Delonge granda parto de la poezi-verkoj de Botev fariĝis amataj kantoj de nia popolo. En la recitalo ankaŭ ili devas ĉeesti. Same oni devas pensi pri aliaj arangoj dumrecitalaj, ligitaj kun la antifaŝisma karaktero de la festo de 2a de junio, kiuj pliriĝis kaj variigus la programon.

Por ĉio ĉi oni devas komenci preparon jam en la aŭtuno. Nia amo al Botev kaj E-o devigas nin prepari la recitalon por 1982 tiel, ke ĝi transformiĝu en veran feston por la bulgaraj esperantistoj kaj ties multnombraj amikoj tra la tuta mondo.

Kunĉo VÁLEV

LA PREMIITOJ EN LA BOTEV-RECITALO

- | | |
|----------------------|------------------|
| I Antoaneta Mateeva | — Veliko Târnovo |
| Esperantina Tričkova | — Vraca |
| Rumjana Petrova | — Orjahovo |
| II Cvetana Ninova | — Vraca |
| Ivanka Markova | — Varna |
| Kapka Stojkova | — Orjahovo |
| III Canka Miteva | — Vidin |
| Diana Ivanova | — Svoĝe |
| Grozdenka Filipova | — Pazarĝik |
| Marija Staneva | — Plovdiv |
| Rajnička Kalojanova | — Sofio |
| Saŝka Ŝekerova | — Pazarĝik |

LA PREMIITOJ DE LA DISTRIKTA ESTRARO DE BEA — VRACA

- | | |
|-----------------------|------------------------------------|
| 1. Mariana Dobrova | — Veliko Târnovo |
| 2. Aneta Donovska | — Vraca |
| 3. Marieta Vâlčeva | — v. Novo Selo, distrikto de Vidin |
| 4. Rosica Ĝarkova | — Kneja |
| 5. Tatjana Kalenska | — Vraca |
| 6. Stamenka Dimitrova | — Botevgrad |
| 7. Mariana Najdenova | — Trojan |

LITERATURA KONKURSO DE «BE» — 1981

ORIGINALA POEZIO

I premio: Penka Papazova el Jambol („Pano“, „Konfeso“)

II premio: Marin Bačev el Sofio („Printempo“)

III premio: Vjačeslav Rojdestvenskij el USSR („Estu feliĉa la ter!“)

Emil Dimov el Varna („Kredo“)

TRADUKITA POEZIO

I premio: Violin Oljanov el Sofio („Poemo pri Bulgario“ de Evtim Evtimov)

II premio: Nikolao Fedorov el USSR („Maro glorinda, sankta Bajkal“)

III premio: Resica Georgieva el Pazarĝik („Ideala sono“ de Ivan Vazov)

Prodan Prodanov el Sofio („Memoro“ de Stanka Penčeva)

KANTOJ

II premio: Bojko Teodoroviĉ kaj Ivan Marčencenka el USSR („Himno al la paco“ — teksto kaj melodio)

ORIGINALA PROZO

II premio: Bernard Golden el Hungario („La tragedio de Ĉerven“)

Ŝiŝman Bočev el Sofio („Letero el la infero“)

III premio: Stefan Ganev kaj Stojan Voŝčev el Ruso („Kuragulo“)

V. Glazunov el USSR („Bulgara rapsodio“)

Evgenij Ŝuvaev el USSR („Patrinioj de Bulgario“)

NOVA LITERATURA KONKURSO

Dediĉe al la 100-a naskiĝtago de l'granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov kaj la 75-jariĝo de la Bulgara Esperantista Asocio, kiujn oni celebros en 1982 la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas novan grandan literaturan konkurson. Oni povas partopreni ĝin per: poezio (originala kaj tradukita); prozo (nur originala) — rakontoj, eseoj, rememoroj,

fabeloj; kantoj (kun propraj teksto kaj melodio aŭ nur per melodio por tradukita teksto); artikoloj (nur lige kun la bulgara E-Asocio kaj la bulgara E-movado).

En la verkoj ni rekomendas jenajn motivojn:

I. Pri G. Dimitrov: personeco, vivo kaj batalo de G. Dimitrov; Dimitrov kaj la internacia laborista kaj komunista movado; Dimitrov-standardo de la demokratiaj movadoj tutmonde; Dimitrov — heroo el Lejpego; Dimitrov kaj la batalo de la bulgara popolo por libereco kaj socia justeco; Dimitrov kaj la bulgara-sovetia amikeco; Dimitrov kaj la junularo; Dimitrov kaj la E-movado.

II. Bulgara E-Movado: historio, estanteo kaj estonteco de la bulgara E-movado; la bulgaraj e-istoj — aktivaj batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, konsciaj konstruantoj de nova vivo en nia patrujo; la e-istoj — ardaj patriotoj kaj internaciistoj; la bulgaraj e-istoj — sindonaj batalantoj por paco kaj internacia amikeco; E-o serve al la nacia kulturo kaj arto, serve al Popola Respubliko Bulgario; E-o serve al internacia amikeco.

La konkurson povas partopreni ĉiu bulgara aŭ alilanda e-isto. Ĉiu rajtas uzi nur unu pseŭdonimon kaj sub ĝi sendi ne pli ol du verkojn de ĉiu ĝenro kaj speco. Laŭ sia enhavo, stilo kaj grandeco ĉiu verko devas esti konvena por publikigo en nia revuo, do rakontoj estu ne pli longaj ol 6 tajpitaj paĝoj (po 30 linioj surpaĝe), la eseoj kaj artikoloj — ne pli ol 4-paĝaj.

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj ankaŭ aperos en „BE“.

La konkurso estas strikte anonima. Ĉiu tajpita konkurso, devas esti subskribita per pseŭdonimo. La veran nomon kaj adreson de la konkurso oni skribu sur slipo, metu ĝin en koverton kaj surskribu la koverton per la pseŭdonimo. Tiun koverton kaj konkursojn oni metu en grandan koverton kaj sendu ĝin al adreso:

Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, bul. „Ĥristo Botev“ 97,

1303 Sofio, Bulgario. En angulo oni metu „konkurso“.

Limtempo por sendi konkursojn:

la 15an de januaro 1982

Samideanoj el ĉiuj landoj, partoprenu amase nian konkurson!



ZORGOJ PRI LA JUNULARO

„La infanoj — tio estas la floroj de l'vivo“ — diris la fama soveta pedagogo Makarenko, kaj la membroj de DE de BEA — Burgas deklaras: „La junularo — tio ja estas la estonteco de E-o“. Konsiderante tiun malnovan veron, la Distrikta Estraro kaj la Societaj Estraroj en la lastaj 2—3 jaroj akcelis la varbadon de junuloj kaj junpioniroj kaj klopodis reteni ilin en la E-societoj de Burgas, Pomorie, Ajtos. Gvida direkto en tiu agado estis la decidoj de la 40a kongreso de BEA, la plenkunsidoj de CE, la decidoj de junularaj E-konferencoj kaj koncernaj lokaj decidoj.

Antaŭ jaroj en la E-societoj de Burgas kaj Pomorie la nombro de gejunuloj estis kalkulebla per la fingroj de la mano kaj en Ajtos entute ne estis junaj homoj. Nun la situacio estas jena: en Burgas — 35 gejunuloj el ĉ. 80 membroj, en Pomorie — 20 el 50 membroj, en Ajtos — entute 20 junaj membroj. El inter la junularo estas elektitaj 13 membroj en la Distrikta kaj la Societaj Estraroj.

Ekzistas objektivaj kaj subjektivaj malfacilaĵoj ĉe la varbado de junaj homoj al E-kursoj: kursoj de fremdaj lingvoj, manko de amuzoj en la E-klubo, manko de ligoj al Junularaj Domoj kaj Klubo, nesufiĉa utiligo de vidaj propagandiloj pri E-o k. a. En februaro ni pretigis pli ol 1000 flugfoliojn kaj aliajn informajn materialojn pri E-o.

Grava tasko estas ankaŭ la reteno en la E-societoj de la jam varbitaj gejunuloj. Cele al tio ni proponas al la gejunuloj, finintaj unuan gradon, partopreni en forestaj kursoj.

La DE pagas parton de la partoprenkotizo de junaj aktivuloj en II kaj III gradoj de la Internaciaj E-Kursoj en Varna. Du gejunuloj el Ajtos — estontaj kursgvidantoj, partoprenos ĉi-somere je kostoj de la DE en Internacia E-Lernejo en Eger (Hungario).

La kursestroj instigas la junajn kursanojn korespondi kun eksterlandaj amikoj ankoraŭ dum la kurso. Rezulte de tio oni aranĝas reciprokajn gastadojn kaj pliriĉigas siajn libro-kolektojn. La pli aĝaj membroj transdonas iompostioje la gvidajn societajn postenojn al gejunuloj. Oni elektas ilin prezidantoj, sekretarioj, respondeculoj pri la instrulaboro k. a. Tio stimulas la gejunulojn, kredigas ilin je si mem, kaj aliflanke retenas ilin en la societoj.

Junularaj E-grupoj ekinicias la organizadon kaj gvidadon de la kultur-amasa kaj turista agadoj en la societoj. Omaĝe al rimarkindaj datoj kaj festoj oni aranĝas ekskursojn al Kotel, Jeravna k. a. Ĉefa provprezento antaŭ la Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto estis la distrikta revuo en marto. Partoprenis 25 personoj. Ĉeestis multaj membroj de E-societoj el la distrikto.

La DE de BEA — Burgas opinias, ke necesas plilarĝigi la varban laboron inter la junularo por altiri pli da gejunuloj al E-o. La estraroj de la junulara E-societo en Ajtos, de la junularaj E-grupoj en Burgas kaj Pomorie devas direkti sian agadon al pli larĝa disvastiĝo de la Internacia Lingvo inter la junaj homoj.

Elena STOJKOVA

VIRINA E-RENKONTIĜO


SOFIO. La Virina Komisiono (VK) de BEA okazigis landan renkontiĝon de E-aktivulinoj. Ĝi okazis je la 17a de majo. Partoprenis e-istinoj el Gabrovo, Pernik, Plevno, Sliven, Sofio, Stara Zagora, Sumen, Targovište, Varna kaj Vraca. Honoraj gastinoj estis Tr. Petkova kaj B. Popova.

Belka Beleva, prezidantino de VK, raportis detale pri la Internacia Virina Renkontiĝo en Rotterdam (Nederland) kaj traktis la antaŭstarantajn taskojn de la komisiono. La vicprezidanto de BEA Petar Todorov salutis la partoprenantinojn kaj bondeziris sukcesajn aktivecojn. Sekvis vigla opiniesprimado pri la virina E-agado. Oni esprimis kontenton pri la renkontiĝo kaj pritaksis ĝin utila.

S. K.



PARLAMENTA DANKLETERO



Faksimila teksto de la dankletero de la Bulgara Parlamento al k-do G. Genčev — prezidanto de la Jurista Sekcio de BEA okaze de la traduko en Esperanton de la Konstitucio de PR Bulgario.

EKAPERIS „BULGARA FERVOJISTO“

La Fervojista Sekcio de BEA eldonis unuan numeron de la informilo „Bulgara Fervojisto“. Ties celo estas kontribui al la starigo de pli intimaj ligoj kun ĉiuj fervojistaj societoj, grupoj kaj kun unuopaj e-istoj el la tuta mondo. Oni antaŭvidas aperigi la informilon kvarfoje en la jaro. En ĝi estos publikigitaj fakaj materialoj kaj artikoloj pri fervojista tekniko, korespondadoj pri la vivo de la en- kaj eksterlanda E-movadoj.

La unua kajero entenas la materialojn „Iom pri la nunjara kongresurbo“, „Ponto inter du frataj bordoj“, „Pri la fervojmuzeo en Hamar“, „S-ano Marin Marinov — nia jubileulo“, resumon de la fakprelego „Fervojoj en la malaltaj landoj“ de ing. W. Meijnen k. a.

La redakcio petas regulan kontribuadon per korespondadoj kaj materialoj pri organizaj kaj teknikaj novaĵoj. Adreso de redakcio kaj administrado: „Bulgara Fervojisto“, p. k. 66, BG-1000 Sofio, Bulgario.

TESTAMENTITAJ HAVAJOJ AL ESPERANTO

Je la 24a de aprilo forpasis la multjara esperantistino Maria Zlatareva, naskita en 1898 en u. Svišov. Grandan parton de sia konscia vivo ŝi dediĉis al la humana E-ideo, al la pabatalo.

En 1979 ŝi testamentis siajn tutajn proprajn moveblan kaj nmoveblan havaĵojn al la urba E-societo „Danuba Stelo“ en Svišov. Vere imitinda ekzemplo!

FESTO DE LA TRADICIA BULGARA—RUMANA E-AMIKECO

La Kulturdomo ĉe str. Murcea Voda en Bukureŝto (Rumanio) akceptis gastame multajn lokajn e-istojn. Gasto estis Anton Antonov el urbo Kubrat, kiu estis komisiita de sia E-societo „Progreso“ honori rumajn e-istojn pro aktiva kontribuado kaj meritoj en la bulgara-rumana E-kunlaboro.

Post mallonga salutparolado Antonov enmanigis honordiplomojn al E-klubo en Bukureŝto, al ties prezidanto Bunea Bunescu Ion, prof. Aurel Boia, Eugenia Markoski, Olga Nica, Vochin Marin, Konstantin Dominte, Konstantin Dragne, Mihaj Popescu k. a.

Flanke de la honoritoj dankis Bunescu Ion, Popescu kaj prof. Boia. Ili bondeziris pluajn sukcesojn en la frata rumana-bulgara amikeco per E-o.

A. A

SUKCESA LERNOJARO

ŜUMEN. La E-societoj „Vekigo“, „Progreso“ ĉe la ŝargaŭtomobila entrepreno „Madara“ kaj „Sano“ ĉe la distrikta malsanulejo organizas ĉiujare kursojn por komencantoj. Dum la lernojaro 1980/1981 funkciis kvin kursoj kun pli ol 50 partoprenantoj. Helpe de la distrikta fako „Popola Klerigo“ unuafoje okazis komencanta kurso por geinstruistoj sub la gvido de la „Elstara Lektoro“ Canko Murgin.

Dum sep monatoj la gekursanoj okupiĝis diligente pri E-o sub la gvido de la multjaraj kursgvidantoj Rajna Kasabova, Vasil Georgiev kaj Stefka Miĥajlova. La rezultoj estas ĝojigaj: la gekursanoj jam legas kaj tradukas bone. Iuj el ili korespondas kun literamikoj el GDR, Hungario, USSR kaj aliaj landoj.

Post la fino de la lernojaro okazis solenaĵo en la Sindikata Domo. Oni disdonis atestilojn al ĉiuj gekursanoj, sukcese finintaj la ekzamenojn. La lektoroj ricevis donacojn. La prezidantino de la DE de BEA Veska Minčeva salutis varme la ĉeestantojn kaj bondeziris novajn sukcesojn en la ekposedo de E-o.

Cvjatko TODOROV

BUDAPEŝTA ESPERANTO-CENTRO DE UEA

La 28an de marto estis subskribita kontrakto inter UEA kaj Hungara Esperanto-Asocio pri malfermo de Budapeŝta Esperanto-Centro pri eldona kaj sciencteknika agadoj. La kontrakton subskribis G. Maertens kaj d-ro Flora Szabo-Felső flanke de UEA kaj d-ro E. Barath, ĉefsekretario, kaj d-ro I. Pethes, vicprezidanto de HEA.

Prof. d-ro Otto Haszpra, komitatano de UEA kaj vicprezidanto de HEA, gvidos la jam malfermitan oficejon. Kelkaj valoraj kaj prespretaj manuskriptoj de sciencteknikaj libroj atendas presigon.

★ heroo ★ pasinteco



NIA KOMISARO

Al 60a naskiĝtago de Argir Stollov — Toma)

Tri filojn havis patrino Maria Stoilova: Argir, Vasil kaj Mitko. La filoj kreskis en mizero. Frue ili forlasis la lernejan benkon kaj fariĝis metilernantoj. Frue ili aliĝis al RMS (Laborista Junulara Unuiĝo). Kiam en nia lando komenciĝis partizana movado kontraŭ la hitleraj faŝistoj, la triopo aliĝis al diversaj partizanaj grupoj. Argir, fervora esperantisto, aliĝis al sabotadgrupo, kies rifuĝejo estis la Rodopi-montaro, sude de Plovdiv. Lia grupo sabotis fervojojn, ĝenis per embuskoj ĝendarmojn.

En komenco de 1944 la Ruĝa Armeo akiris ĉiam novajn kaj novajn venkojn super la germana armeo. Estis levita la sieĝo de Leningrado, liberigita Odeso kaj la duoninsulo Krimeo. La brava Ruĝa Armeo aliris la orientan landlimon de Rumanio. Tio tre kuraĝigis la bulgarajn antifaŝistojn. Al la partizana movado aliĝis miloj da gejunuloj, inter ili centoj da esperantistoj. Estis organizitaj novaj partizanaj taĉmentoj kaj fondita Popolliberiga Partizana Armeo.

Al la sabotadgrupo, al kiu apartenis Argir, aliĝis novaj batalantoj. Ĝi estis transformita en liberigbrigadon „Georgi Dimitrov“. Sub la pseŭdonimo Toma, Argir estis enoficigita komisaro de la liberigbrigado. Li havis la taskon zorgi pri la politika edukado de la rekrutoj, pri provianto, pri kontaktoj kun la montaranoj en la regiono.

Laŭ ordono de la ĉefa stabo de la Popolliberiga Partizana Armeo, grupo da batalantoj sub komando de nia komisaro ekmarŝis al la suda parto de la montaro por renkontiĝi kun re-

prezentantoj de la brita armeo kaj preni de ili pafarmilojn. La grupo ŝtelmove iradis dum la nokto. Ĉe mateniĝo ili haltis en arbareto en la piedoj de montopinto Ruen, por ripozi kaj dormi dum la tago.

Subite aperis ĝendarmoj. La gardostaranta partizanino Roza rimarkis ilian alproksimiĝon kaj pafe alarmis la grupon kontraŭ la malamiko. La partizanoj preparis sin kontraŭbatali.

La ĝendarmestro altvoĉe ordonis atakon per maŝinpafiloj kaj mitraloj. Li ekcelis kaj pafis en la bruston de la partizanino Jivka. En sango dronis ankaŭ kamaradoj Nikita kaj Bojko. Nia partizanestro ordonis „fajron“. Ekflamis vengemo. La maŝinpafisto Sergeo ekvidis la ĝendarmestron tra la celilo kaj premis la ellasilon. La oficiro terenfalas morta. Ekestis paniko inter la ĝendarmoj. Nia komisaro leviĝis kaj vokis sturme disbati kaj forpeli la malamikon.

Vidante atakantajn partizanojn, la ĝendarmoj forĵetis tornistrojn kaj fuĝis. Iu tamen embuskis kaj mortpafis nian komisaron...

En la bivako de la liberigbrigado regis funebro. Iuj knabinoj ploris.

Post kelkaj tagoj okazis kunveno memore al la pereintaj kamaradoj. La reprezentanto de la distrikta partizana stabo Cavdar faris mallongan paroladon pri la vivo kaj batalo de nia komisaro. Tenante en la mano la fusilon de Argir, li turnis sin al la esperantisto Viktor per la vortoj:

— Jenan pafilon portos vi, kiu distingiĝis en la batalo kontraŭ la malamiko. Vi meritas la armilon de nia komisaro.

Viktor prenis la fusilon en siajn manojn kaj tuŝis per lipoj. Li ĵuris batali ĝis la lasta spiro.

Post kelkaj tagoj, la deksekan de junio 1944 Viktor pereis kiel heroo en sia naskiĝvilaĝo Brestovica, repuŝante sola la atakojn de roto da ĝendarmoj...

Venis la tago de libero — la Naŭa de septembro 1944. Revenis la partizanoj. Patrino Maria ĉirkaŭbrakis nur la plej junan sian filon...

IVAJO — BULGARA „VILAĜANA“ REĜO



Post la morto de reĝo Ivan—Asen II (1218—1241) en Bulgario komenciĝis procedo de politika kaj militista dekadenco, de socia disfalo. La kortegaj kolizioj kaj la arbitraj agoj de la nobeloj kondukis al civitana milito (1257—1263), definitive senfortiginta la landon. En plej peza stato estis la vilaĝana loĝantaro. Turmentita per pezaj impostoj, kolektataj profite por la regpotenco, la nobeloj kaj la eklezio, la vilaĝanaro malsatis. En la dua duono de la 13-a jarcento la konstanta pliakrigo de la socialaj konfliktoj provokis neorganizitajn ribelojn.

En la printempo de 1277 en la nordorientaj bulgaraj regionoj eksplodis granda vilaĝana ribelo, organizita kaj gvidata de la iama ŝafisto Ivajlo. La vilaĝanoj forprenis la bienojn de la nobeloj, ruinigis ilin kaj havigis al si provianton kaj armilojn. Dum mallonga tempo sub la gvido de Ivajlo kolektiĝis grandega ribela armeo, kiun li gvidis kontraŭ la tataroj. Post kelkaj venkaj bataloj Ivajlo sukcesis disbati la tatarojn kaj forpeli ilin el la bulgaraj regionoj, kio alportis al li tutpopolan gloron. La famo pri la heroo gvidanto de la vilaĝanoj disvastigis ĉe ekster la landlimoj.

La venka antaŭenmarŝo de la armeo de Ivajlo kaŭzis maltrankvilon ne nur en la reĝa kortego, troviĝanta en la bulgara ĉefurbo Târnovo, sed ankaŭ en Bizanco. Ivajlo dufoje sukcese disbatis la grandegajn bizancajn armeojn, senditajn kontraŭ li de la imperatoro Mihail VIII — Paleolog kaj baldaŭ Ivajlo kune kun sia armeo proksimiĝis al la muroj de Târnovo. La regantino de Bulgario reĝino Maria, strebante malhelpi la bizancanojn forpreni la tronon de ŝia filo Mihail, proponis al Ivajlo la reĝan kronon. Komence Ivajlo rifuzis la proponon, sed en 1278, estinte inter du fortaj malamikoj — la tataroj kaj la bizancanoj, akceptis ĝin pro la deziro stabiligi la bulgaran ŝtaton kaj unuigi la popolon. Tiamaniere Ivajlo fariĝis la unua „vilaĝana“ reĝo de la Mezepoko. La ribelo de Ivajlo estis la unua sukcesa antifeŭda ofensivo en Eŭropo, komen- cinginta kiel loka sociala ribelo kaj transformiĝinta en veran vilaĝanan militon kun definitiva antifeŭda karaktero.

En la aŭtuno de 1278 la tataraj hordoj denove invadis en Nordan Bulgarien kaj Ivajlo gvidis la

armeon kontraŭ ili. En la ĉefurbo, eluzinte lian for- eston, la nobeloj disvastigis onidiron, ke Ivajlo estas mortigita kaj ili komencis retraktojn kun la bizan- ca imperatoro. En 1279 en Târnovon eniris bizanca armeo. Ivajlo rapide direktis la armeon al la ĉefurbo kaj senreste disbatis la 10-milan armeon de la bizanca militestro Murin. La saman sorton havis ankaŭ la alia bizanca armeo, gvidata de la militestro Aprin. Kiam la vojo al Târnovo denove estis senbara por Ivajlo, la nobeloj elektis kiel reĝon unu el la plej konataj feŭduloj — Georgi Terter.

En la komenciĝinta nova milito kontraŭ la feŭdulo la ribela armeo de Ivajlo iompostioe perdis fortojn. Ivajlo estis devigita fugi al sia malamiko — la nepo de Cingiz Ĥano — Nogaj, por konvinki lin por kuna ofensivo kontraŭ la feŭduloj kaj kontraŭ la bizancanoj, sed la tataraj Ĥano mortigis lin. Tiel tragike finiĝis la vivo de la vilaĝana gvidanto.

La ribelo de Ivajlo restas en la historio kiel unu el la plej brilaj paĝoj de la batalo de la bulgara popolo por sociala justeco.

Doc. GEORGI PEŠEV



Ivajlo kun sia armeo antaŭ la fortikajmuroj de Târnovo



FORUMO DE BULGARISTIKO

La Unua Internacia Kongreso de bulgaristiko, okazinta en majo k.j., estas unika en monda skalo.

La Forumo faris sian laboron sub la alta protektado de Todor Jivkov — prezidanto de la Stata Konsilantaro de Bulgario.

Kongreso de sciencistoj-fakuloj pri bulgaraj lingvo, literaturo, kulturo kaj historio, ĝi prezentis la atingojn de la bulgara ŝtato en ĉiuj sferoj de la vivo, pliriĉigis per novaj vidpunktoj la sciencan bulgaristikon. Kaj tiu scienco havas kiel sian ĉefobjekton Bulgariion — la historion de ties popolo, la bulgarajn lingvon, kulturon, literaturon kaj arton, etnografion, ekonomion kaj politikon, la bulgaran kontribuon al la monda historia evoluo.

La bulgaristiko havas siajn inspiritajn kreantojn kaj senlacajn apostolojn en multaj landoj de la mondo. En Sofio kolektigis pli ol 500 bulgaraj sciencistoj kaj pli ol 500 fakuloj pri bulgaraj lingvo, literaturo, kulturo kaj historio el 56 landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Azio.

Dum la kongrestagoj en la aŭditorioj de la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ — la plej malnova altlernejo en Bulgario — sonis la voĉoj de mondfamaj sciencistoj. Sufiĉas menci la nomojn de akademiano **D. Lihačov** kaj de koresponda membro **Markov** el USSR, de la profesoroj **Slavski** kaj **Tomaŝevski** el Pollando, de **Papadopoulos** el Greklando, **Kastelan** el Francio, **Gezeman** el FRG, **Pikio** el Italio, **Juha** el Hungario. Kaj krome — la rektoroj de la universitatoj en **Bogoto** kaj **Limo**, en **Krakovo** kaj **Bratislavo**.

Kiel enkondukon al la kompleta laboro de la kongreso servis la raporto „1300 jarojn bulgara ŝtato“ de akad. **Dimităr Kosev**.

La diskutoj, organizitaj en 7 sekcioj, 23 subsekcioj, 4 simpozioj kaj la interparoloj ĉirkaŭ la „ronda tablo“ estis direktitaj al

jenaj ĉeftemoj: „La bulgara ŝtato dum la jarcentoj“, „La bulgara literaturo kaj la monda literatura proceso“, „Socialaj kaj revoluciaj movadoj en Bulgario kaj ilia loko en la monda revolucia proceso“, „La bulgara kaj la monda kulturo — reciprokaj influoj“, „Historio kaj nuna ŝtato de la bulgaristiko“, „Evoluo de la scienco kaj la instruado en Bulgario“. Surbaze de novaj historiaj faktoroj kaj donitaĵoj oni esploris la procesojn de unuiĝo de slavoj kaj prabulgaroj kaj la kreon de la bulgara ŝtato, la novaĵojn en la bulgaristiko. La muzikologoj fiksas sian atenton al karakterizaj specifaĵoj de la malnovbulgara kantmaniero.

La ĉirkaŭ 1000 raportoj, legitaj antaŭ la Kongreso, kondukis al la konkludo, ke la bulgaristiko estas reale ekzistanta monda scienco, komplekso da sciencoj pri Bulgario.

AKADEMIANO DMITRIJ LIHAČOV — USSR

— Dank' al la Tarnova Literatura Skolo, kies bazaj principoj estis akceptitaj en Rusio, Bulgario ekstaras ĉekape de l'unuiĝo de la tuta slava literaturo, kio havas grandegan signifon ne nur por Bulgario, sed ankaŭ por la tuta suda kaj orienta slavaro. Kaj tiu rolo de Bulgario por la kultura unuiĝo de la slavaro ne estas arte trudita de la Tarnova Literatura Skolo — Kiril kaj Metodij mem kaj iliaj disĉiploj opiniis, ke ilia faro estas destinita por ĉiuj slavoj.

PROF. ROGER BERNARD (ROJE BERNAR) — FRANCIO

— La bulgara lingvo, implicanta la plej malnovan kaj samtempe plej evoluantan formon de la slavaj lingvoj, estas lingvo de ŝtato, fondita de tjurka-tatara popolo, kiu baldaŭ post tio tenas la palmon de la mezepoka slava kulturo.

IVES MOREAU (IV MORO) — KANADO

— Mi estas sociologo kaj jam multajn jarojn mi okupiĝas pri la bulgara folkloro. Depost 1972 mi gvidas trupon de bulgaraj popoldancoj. Plej alloga en la bulgara dancfolkloro estas ĝiaj ritmeco kaj dinamikeco. Tio ĉi estas virecaj dancoj, paŝoj de fortaj viroj. Ne nur en Kanado, sed ankaŭ en Usono, en Meksikio kaj en multaj aliaj landoj de Latin-Ameriko multaj ensembloj havas en sia repertuaro bulgarajn popolajn dancojn. La rondodanco kaj la „raĉenica“ kunportas komunecon, senton pri kolektiveco, pri certeco. Oni ne dancas en paroj, male, multaj personoj unuiĝas siajn travivaĵojn, trovas emocian resonon de sia deziro pri proksimeco kaj interkomunikado. Tiuj dancoj estas esprimo de la bulgara psiko, de la fiera sento pri virteco kaj liberamo. Kaj tio ne povas ne ravi homojn kiuj deziras interrilati kun la mondo kaj ĝia beleco.

Maria JANKOVA



EN REGENSBURG—IMPONA KONGRESO DE IFEF

Marin MARINOV

„Regensburg situas vere belege, tia regiono ja devis allogi urbon!“ — skribis la granda germana poeto Goethe en sian taglibron pri tiu okcidentgermana urbo kun mainova historio kaj kulturo, la plej norda havenurbo ĉe Danubo.

En Regensburg 515 partoprenantoj el 18 landoj ĝuis la agrablan etoson de la 33a Kongreso de la Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) inter la 15a kaj 21a de majo. Partoprenis 27 bulgaroj. La kongresejo „Kolpinghaus“, situanta en la urbocentro, disponigis bonegajn kondiĉojn por fruktodona laboro. Al la agrabla humoro kontribuis ankaŭ la bela vetero kaj bonega organizado.

La inaŭguro estis solena kaj distra. Antaŭ plenplena salonego kvarteto de fervojista orkestro „Nürnberg“ kreis solenan etoson post la eniro de uniformoj fervojistoj el 13 landoj (Stojanka Arnaŭdova kaj Svetoslav Manev el Bulgario). La prezidanto de LKK Giessner direktis salutvortojn al la kongresanoj kaj la honoraj gastoj, kiuj poste parolis senesepte en la Internacia Lingvo: la prezidanto de FISAIC (Internacia Federacio de Kulturflgantaj Fervojistoj) d-ro Emile Schlessler, ia prezidanto de la federacia fervojdirekcio Nürnberg dipl. ing. Horst Weigelt, la ĉefurbestro de Regensburg Friedrich Viehbacher k.a.

Salutparolis ankaŭ la prezidanto de UEA Gergoire Maertens, por SAT salutis Denise Happi — Fosso, por GEA parolis ĝia prezidanto Elsbeth Bormann. En la nomo de la landaj sekcioj parolis 15 reprezentantoj. Nomo de fervojista sekcio de BEA salutis M. Marinov.

La estraro de IFEF interkonsentis kun la prezidanto de UEA Maertens partopreni la aktivecojn de UEA por pliintensigo de la ekstera informado. Oni akceptis tekston de saluttelegramo al la ĝenerala direktoro de

Hungara Statfervojo Zoltan Szűcs lige kun la venontjara kongreso en Balatonfüred (2—8 de majo 1982). En 1983 la IFEF-kongreso okazos en Belgio, kaj en 1984 — en Suna Bordo apud Burgas (Bulgario).

Interesan fakprelegon „Trajno sen radoj“ prezentis Gernot Ritterspach (FRG). Gi tuŝas la evoluon kaj la nunan stadion de la ŝvebtrajnoj, precipe la sistemojn de elektrodinamika kaj elektromagneta ŝvebigo. La preleginto traktis detale la faritajn elprovojn en FRG.

La distraj programeroj abundis apud la laboroj: uniformprezentado sur la teraso apud la kongresejo kun sekva koncerto de la trombona orkestro, plenumoj de la mondkonata knaba ĥoro „Katedral-paseroj“, folkloro vespero „Regensburga bukedo“, „De l'mezepoko ĝis nuntempo“ — muzika programero en la preĝejo Sankt Emmeram.

La 33a kongreso de IFEF imponis per sia amaseco, laboraktiveco kaj varia distra programo. Gi estis modele organizita internacia E-arango kun fruktodonaj rezultoj por la fervojistoj en la tuta mondo.



Uniformaj kongresanoj

Literaturo Artoj Kulturo

DOBRI JOTEV

KOMUNISTO

El la „Travivataj rakontoj“

Mi vidis multajn komunistojn en momento de sublima elprovo. La plimulto da ili estis, kiel ofte oni diras, herooj — haltigis ilin nek obstakloj, nek policaj spektakloj, nek pendigilo.

Nature, ili havis diversajn karakterojn, kulturon, intelektan nivelon kaj pro tio ĉiu el ili portis sian sorton laŭ sia koncepto.

Iuj kvazaŭ celis, ke ilia heroeco videbligu. Iliaj gestoj memorigis aktoran ludon, la vortoj — triumfan deklaron, la sufero — scenon el antikva dramo. Verŝajne ilia vanteco estis sufiĉe granda.

Aliaj ŝercis antaŭ morto. Eble ili sentis timon, ke ili ne estigu ridindaj per sia seriozeco.

Triaĵ do subprematis ĉion, kio povus doni videblan esprimon de ilia heroeco. Ili sin ĝenis pro la grandaj vortoj, pro la nekonvenaj ŝercoj, pro la demonstrita sufero. Kvazaŭ ili estis naskitaj por havi nur devojn, sed neniam rajtojn.

Multaj el ili en la lasta momento kantis. Iliaj kantoj ankaŭ estis diversaj. Iufoje ili sonis simile al subpremita angoro. Iufoje ili elmontris memtrankviliĝon, la lastan fortostreĉon de la heroo manifestiĝo, furiozecon, alkondukitan ĝis frenezeco.

Ne foje mi aŭskultis antaŭmortajn kantojn kaj ili ĉiam min subprematis. Mi ne povis akcepti la nehuman klopodon, ke ili demonstru ion supernaturan kaj tiai maniere la homo aspektu plej natura.

Jes, mi vidis multajn komunistojn kaj memorfiksas ilin, sed unu el ili restis en mia animo pli brila ol ĉiuj.

La unuan fojon mi renkontis lin en la polico.

La duoble pli aĝa ol mi vilaĝano, ne tre malalta, kun brunkoloraj kamlotaj vestoj kaj malgrasa vizaĝo tuj altiris mian atenton. Sajne oni pridemandadis lin senrezulte, ĉar kiam oni enkondukis min en la esplorĉambron, li silentis, do tiel, ke ĉio ĉirkaŭe, inkluzive la policanojn trafis en silenton.

Tamen, kiel silentis tiu ĉi homo! En similaj momentoj sur la vizaĝoj de la arestantoj plej ofte

videbligas decido diri nenion. Ili rigardas obstine aŭ kun malestima aŭdaco. La kuntiritaj lipoj provokas la furiozecon de la torturistoj, strebantaj je ĉiu prezo eltiri konfeson.

Lia silento estis alia. Simpla, natura silento. La okuloj kontemplis trankvile ie trans la policanojn kaj kvazaŭ serĉis malkovri malproksimecojn, ĝis kiuj oni ne povas atingi facile. Sur la vizaĝo mankis postsigno de streĉeco.

La malnova komunisto silentis ne pro konscio, ke li devas silenti samkiel li spiras ne pro konscio, ke li devas spiri. La tuta lia aspekto nesentebles ekparolis al mi pli klare ol kia ajn parolo.

„Kion fari — ni troviĝis en la polico. Tio ja ne estas mirinda. Estus mirinde, se ni neniam troviĝus tie. Oni torturos nin. Kion fari — ni ne estas en preĝejo. Ni silentos. Kompreneble tie ĉi estas plej konvena loko por silentado.“

Vi eble ne eltenos kaj faros konfesojn. Tio ankaŭ ne estos mirinda. Estus mirinde, se ĉiuj povus elteni.

Vi opinias, ke se vi perfidos la kamaradojn, ili nomos vin perfidulo. Nepejokazos tiel kaj ne

estos mirinde. Mirinde estus, se ili ne nomus vin perfidulo, sed nur neelteninto. Tiel estas ĉe ni, la homoj.

Tamen vi povus elteni — la juneco havas fortajn nervojn. Tiam oni nomos vin heroo. Vi fieros pri tiu ĉi titolo. Nenio mirinda! Mirinde estus, se vi ne fierus.“

La senvortan dialogon ĉesigis la policanoj. Ili intencis torturadi la malnovan komuniston antaŭ miaj okuloj, por ke mi povu vidi kion atendas min, se mi havas la malprudentecon silenti kiel li.

Oni ordonis, ke li demetu la mokasenojn. Li faris tion, samkiel li farus ĝin vespere en la domo antaŭ dormo — nek rapide, nek malrapide. Sur liaj piedoj estis humo — oni kaptis lin ja en la kampo.

Post la mokasenoj li demetis ankaŭ la ŝtrumpojn antaŭ ol ili ordonos, ĉar li sciis, ke sekvos simila ordono.

Oni diris, ke li etendu la manojn. Li etendis, samkiel li etendus ilin matene al la bofilino, por ke ŝi surverŝu akvon. Oni ligis la manradikojn kaj igis lin kuntiriĝi tiel, ke la genuoj restu en la ringo de la manoj kaj la kruroj. Poste oni ruligis lin dorsen.

Nun li prezentis ion similan al globo, kaj la nudaj plandoj — plej oportunan lokon por batado.

Komenciĝis la torturado. La vilaĝano ne eligis sonon, ne ekĝemis. Ĉirkaŭ dek policanoj anstataŭigis unu la alian — se ia laciĝis, la dika kaŭĉuka kablo transiris en la manon de la alia. Sur la frunto de la torturato aperis malvarma ŝvito.

Fine lia silento senkuragiĝis la torturistojn. Oni malligis lin.

Li stariĝis senforta kaj post momento sidigis sur seĝon. Oni alportis pelvon kun malvarma akvo, kaj ordonis, ke li trempu la piedojn. Li plenumis la ordonon, simile al io, kion li nepre plenumus.

Post nelonga tempo la piedoj ŝvelis tiom, ke perdis la formon. Iu policano aludis provoke:

— Vi silentas. Eĉ ne ĝemas. Sed nur post iom ni rekomencos. Tiam vi aŭdigos vin, ĉar la bato



al la ŝvelinta piedo ne estas ŝerco.

La malnova komunisto ekrigardis lin en la okulojn — ĉu li ekĝemis aŭ ne, ĝi estas sensignifa detalajo.

Denove oni ligis lin. Post la unua bato al la nudaj ŝvelintaj plandoj li ekĝemis. Post la dua li svenis.

Sajnis al mi, ke mi aŭdis ie de la malproksimeco lian silenton.

„Mi ĝemas, nenio mirinda! Estus mirinde, se mi ne aŭdigus sonon!”

La duan fojon mi vidis la malnovan komuniston antaŭ la tribunalo. La prezidanto starigis mekanike la kutimajn demandojn: — Edziĝinta? Needziĝinta? Kondamnita? Nekondamnita?

Nur tiam mi povis aŭdi lian voĉon: — Tie estas skribite!

Al la demando, kia estis lia agado,

li respondis per silento. Liaj okuloj rigardis tra la juĝistaro. Eble ili vidis malproksimecojn, ĝis kiuj oni ne atingas facile.

Oni redemandis ĉu li konfesis sin kulpa. La demando ekpendis en la silento — senseca kaj senforta. Li ricevis mortkondamnon — per pendumo.

Iu junulino el la publiko ne eltenis, ĉirkaŭbrakis la kondamniton kaj ekploris. Li senvorte ekkaregis ŝian hararon. Lia silento denove ekparolis: „Ploretu, se vi deziras plori. Parto de l'angoro elfluas kune kun la larmoj. Homoj, kiuj neniam ploras, estas nesufiĉe homoj.”

Kiel vi aŭdis, la kulpuloj kondamnis min — la nekulpulon. Nenio mirinda! Estus mirinde, se mi — la nekulpulo, kondamnis la kulpulojn! Kaj ankoraŭ pli mirinde,

se ne necesis, ke iu procesu kortaŭ iu ajn!

— Mi ankaŭ suferas neelporteblan turmenton! Nenio mirinda! Mirinde estus, se mi ne suferus turmenton!”

La verdikton oni plenumis ĉirkaŭ unu monato post la proceso, kelkajn tagojn antaŭ la Unua de majo. En la lastaj minutoj la malnova komunisto ne komisiis, ke oni venĝu por li, ne faris testamenton, ne ekkantis!

Tiu ĉi homo pasis tra la polico, tra la juĝistaro, tra ni, tra l'mondo, tra l'morto kiel ia varmega silento kaj forportis kune kun si la sekreton, kiun, se mi provus diveni, neniam mi ĝin divenus.

Lian nomon mi ne volas mencii — la nomoj ripetigas, sed tamen li estis neripetebila!

Tradukis: L. BOJAĜIEVA

TUTMONDA SONORO

K. Kalocsay

~~~~~

TUTMONDA  
SONORO

Poezia antologio

en Esperanto

tradukita el 50 lingvoj

Jam komenciĝis la redaktaj laboroj super la giganta tradukantologio de Kalocsay, super «Tutmonda Sonoro».

Intertempe la laboroj daŭris bonritme, kaj ankaŭ ampleksiĝis la materialo. Ĉar klariĝis, ke profesoro Waringhien gardas amason da Kalocsay-tradukaĵoj, ĝis nun neeldonitaj. Li afable disponigis tiujn manuskriptojn, kaj tiamaniere «Tutmonda Sonoro» komencas havi siajn liniajn konturojn: ĝi enhavos inter 17—10 000 versojn, t. e. 581 poemojn de 185 poetoj, verkintaj entute en 30 lingvoj.

La akompana bildo ankoraŭ ne prezentas realan scenon: ĝi estas fotista lertajo. Ni tamen esperas, ke la volumo povas eliri dum la frua aŭtuno, por inde festi la 90-an naskiĝtagon de Kalocsay, la 6an de oktobro.

La subaj poemoj deziras iom sentigi la variecon de la enhavo de tiu ĉi duvoluma, ĉ. 700-paĝa, fortike bindota verkego.

(El «Hungara Vivo», 1/1981)

IVAN VAZOV

### AMO NECESAS

Tre honorindaj estas: la indigno pri ĉiu hom' la severjuĝa voĉ', vortvipoj flamaĵ kun kolera digno pri mankoj, kulpoj, malvirtaj', diboĉ'.

Kaj bone estas: vipi la jarcenton, pri l'kulpa mondo esti akuzist', insultojn galajn ĵeti sur homgenton, ripetadatajn ekde l'mondekzist'.

Sed jen plibono, tamen frato mia, ol la kolero nobla kaj furor', ĝi estas amo: heroaĵo dia, tre malfacila nun, sed granda glor'.

Ĉar ami estas scii pekardon, kaj scii: estas granda pov' en ni, ĉar ami estas: kun kuraĝ' rekonni: ni pekas, kiel ĉiuj, se ne pli.

Kaj kredi: venkos Dio lumosage en kompatinda homa korprofund', ne vorte lukti kun Malbon', sed age, balzame veni, ne kun vip' al vund'.

Juĝvortojn ĉiu, eĉ krimulo trovas, la mond', jen, plenas de malama bru'. Amo necesas al ni, nur ĝi povas ekteni sanktan krucon de Jesu'.

(El la bulgara)

\*\*\*

A. S. PUŠKIN

### LA EĤO

Se fulmotondro, voĉ' fanfara, besthurlo en la dens' arbara, sur knabinlipoj kanto kara al vi atingas, vian respondan vorton, kara, tuj vi resvingas. Se la ĉielon tondro fendas, se ŝtormo blekas, rokoj plendas, se ŝalmo trilas, vi resendas ĝin per ripeto. Respondon vane vi atendas. Kaj la poeto? . . .

(El la rusa)



## VOJAĜO AL STRALZUND

En la vagonaro el Graifsvald ĝis Stralzund ni veturis kun grupo da junpioniroj el Germana Demokratia Respubliko: plejparte blondetaj, kun lentugoj sur la nazetoj, kun turistsaketoj sursultre.

— Kien vi vojaĝas? — demandis mia kunvojaĝanto-junpioniro.

Oni eksilentis, komprenante, ke ni estas fremdlandanoj. Nur du knabinoj respondis senĝene:

— Ni vojaĝas ekskurse al Stralzund.

La germanetoj parolis vigle, ridis, petolis kaj de tempo al tempo rigardis nin.

Apud mi sidis knabino en ruĝa jako. Mi montris al ŝi niajn monerojn.

— Kiaj ili estas? — ŝi prenis la monerojn kaj ekrigardis ilin kun intereso.

— Bulgaraj!

— O, el la lando de rozoj! — diris la knabino.

— Ni donacas ilin al vil — interpretis mia kunvojaĝanto-junpioniro.

— Mi tre, tre dankas vin! — ekĝojis la knabineto en la ruĝa jako kaj tuj fanfaronis al siaj gekamaradoj, kiuj rigardis ion tra la fenestro.

— Rigardu bulgarajn stotinkojn! — ŝi montris la monerojn.

— Ĉu vi povas doni ankaŭ al mi? — petis alia knabino.

Kaj post ŝi la peton ripetis knabeto. . . Unu post la alia etendiĝis infanaj manoj.

Apenaŭ sufiĉis la stotinkoj. Kiam ili finiĝis, sur la benko apud mi, la infanoj amasigis paketojn kun kukoj kaj biskvitoj, pomoj kaj piroj.

— Ĉio estas por vil — montris ilin la knabino en la ruĝa jako, kiun mi ekkonis unue.

Kompreneble, ni volis malakcepti ilin, sed la instruisto diris:

Sur la kovrilpaĝo: Sfona barilefo de Madara-Ĉevalrajdanto.

— Ni petas vin preni la donacetojn, ĉar alie la infanoj ofendiĝos. Tio estas signo de amikeco.

Nia amikino en la ruĝa jako prenis el sia turistsaketo grandan nilonan sakon. Ĉiuj infanoj komencis meti en ĝin la kukojn, la biskvitojn, la pomojn kaj la pirojn. . .

En Stralzund adiaŭe la germanetoj mansvingis al ni kaj ekiris trarigardi la urbon.

Ni restis sur la perono kaj de tempo al tempo refreŝigis niajn buŝojn per freŝaj piroj kaj pomoj. Dum ni atendis la alian vagonaron, mi pensis: „La infanoj ĉie similas unu al la alia. En la tuta mondo ili estas egale amikemaj. . .“

Ljudmila PASPALEEVA

(El "Renkontoj kun miaj malgrandaj amikoj")

## EZOPA FABLO

La ĉeval' kaj bovo, le,  
ekdisputis energie  
pri l' merito  
en milito.

Diris la ĉeval' incite:

«Eh, malsprite  
estus dubi nian gloron  
kaj valoron.

La ĉevaloj  
al bataloj  
kuri ĉiam estis pretaj

Je l' trumpetaj  
sonoj,

(iom helpis ankaŭ spronoj).  
Kaj la ŝarĝon de l' kanonoj,  
tra abruptaj ŝtonoj,

kluj trenis?  
Nur nil! — la ĉevalo hennis.

Bov' respondis dum remaĉo:

„Ĉevalaĉo!

Vi ja vane fanfaronas;

ĉar ni donas  
tamen la plej grandan servon!

Ja al si la cerbon  
la marŝalo vane rompas,  
vane pompas

la kuraĝo,  
se l' furago  
mankas.

Kaj al kiu dankas  
la viandon la soldat' malsata?

Al la bovo malŝatata!

Via gloro sole ŝajnas;  
ĉiun venkon bovo gajnas.“

Paŝtis sin, melankolie,  
ankaŭ la azeno. tie.

Ĝi malplaĉe aŭdis,

ke sin ili laŭdis.

Ĝi iais

kaj balais

la aeron per oreloj,

kaj ekkris: „Bagateloj!

Jen la vero:

sur la Tero,

se azenoj ne amasus,

la milit' eĉ ne okazus!“

KÁLMÁN KALOCSAY



## BULGAROJ VENKIS LHO TSE



La bulgara kaj la nepala flagoj sur Lho Tse

La mondaj telegrafaj agentejoj anoncis gravan emocian novaĵon el la ĉefurbo de Nepalo—Katmandu: tri bulgaroj — Ĥristo Prodanov, Metodi Savov kaj Ognjan Balĝijski, membroj de la unua bulgara alpinista ekspedicio en la Himalajo, la 30an de aprilo k. j. ĉirkaŭ 13.50 h. sukcesis venki (sen oksigenaj maskoj!) Lho Tse — la kvaran laŭ alteco montopinton en la Himalaja montoĉeno. Malgraŭ la malfavoraj atmosferaj kondiĉoj, rezulte de obstinaj laboro kaj penoj de ĉiuj 18 membroj de la ekspedicio kaj de 6 ŝerpoj estis organizitaj kaj lokitaj kvar helpendaroj: la unua je alteco de 6080 metroj, la dua — je 6850 m, la tria — je 7560 m kaj la kvara — la ŝtorma — je ĉirkaŭ 8000 metroj.

Laŭ la anticipe pretigita plano la atako al la montopinto Lho Tse estis antaŭvidita plej frue por la 1a de majo. La tri bulgaraj alpinistoj posedis oksigenajn maskojn, sed ne uzis ilin pro sia bonega prepariteco.

En la 51-jara historio de la bulgara alpinismo la atako al Lho Tse sendube estas la plej granda sukceso. Ĝi estas dediĉita al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato.

La montopinto Lho Tse situas en la centra montoĉeno de la Himalaja masivo en najbareco kun la plej alta en la mondo montopinto Everest (Ĉomolungma) — 8848 m. En la speciala alpinista literaturo oni mencias du altecojn: la malnovan — 8511 m kaj la novan (laŭ la plej lastaj mezuroj en 1979) — 8501 m. La nomo konsistas el du tibetaj vortoj: «Lho» (suda) kaj «tse» (montopinto). La unuan fojon ĝi estis malkovrita de angla ekspedicio, kiu havis la taskon prepari mapojn de tiu regiono (la 10an de junio 1921).

Ekspediciojn al Lho Tse organizis angloj — en 1949 kaj 1951 (en la lasta partoprenis ankaŭ Hillary, kiu poste estis la unua venkinto de Everest en 1953); la svisoj atingis la altecon de 8000 m kaj preparis detalajn mapojn de la itinero. La unuaj venkintoj de Lho Tse estis Ernst Reis (36-jara) kaj Fritz Lussinger (35-jara), kiuj organizis ses helpendarojn. La atako al la montopinto daŭris 42 tagojn.

La unua vintra provo grimpi la montopinton faris en 1974 pola ekspedicio. Al poloj apartenas la kontribuo grimpi Lho Tse aŭtune post la periodo de musonoj. La vojo de la bulgaraj alpinistoj trapasis la klasikan itinero — la okcidentan parton de la monto, nomitan «La Ripo de Reis».

## KELKAJ VORTOJ PRI LA BULGAROJ, VENKINTAJ LHO TSE

**ĤRISTO PRODANOV** — merita majstro de l'sporto, 37-jara, patro de du infanoj. Inĝeniero-metalurgiisto en la kombinumo «Kremikovci» apud Sofio. Aktive okupiĝas pri alpinismo dum 20 jaroj. Lastatempe li estas la plej elstara figuro de la bulgara alpinismo. Li estis gvidanto de la ekspedicio «Himalajo — 81». En Bulgario li grimpis pli ol 20 alpinismajn objektojn — precipe ĉe vintraj kondiĉoj. Li atingis ankaŭ multe da montopintoj en Kaŭkazo, Alpoj, Tatroj, Pireneoj, Hindukuŝo. Li havis kelkajn brilajn sukcesojn en la altmontara alpinismo, grimpinte en Pamiro la montopintojn «Komunismo» (7495 m — en 1980), «Lenin» (7134 m — en 1975), «E. Korzenevskaja» (7105 m — en 1975, 1978, 1979) kaj «Noŝak» (7492 m — en la Afgana Hindukuŝo, 1976).

**METODI SAVOV** — merita majstro de l'sporto, 34-jara, laboristo-metalurgiisto en metalurgia kombinumo «Kremikovci». Li estas grimpinta ĉiujn alpkarakterajn objektojn en Bulgario kaj multajn montopintojn en Kaŭkazo, Tatroj, Pamiro, Francio, Svislando, Aŭstrio. En la lastaj kelkaj jaroj Savov duloje grimpis ĉe someraj kaj vintraj veterkondiĉoj «la rokego de la morto» Eiger. Lia alpinisma akiraĵo estas kelkaj sepilaj montopintoj en la menciitaj supre montoĉenoj.

**OGNJAN BALĜIJSKI** — merita majstro de l'sporto, 35-jara, patro de du infanoj. Li estas supera instruciisto en la altmontara sav-servo ĉe la Bulgara Ruĝa Kruco. Li aktive praktikas alpinismon jam 18 jarojn. Li ankaŭ estas grimpinta kelkajn sepilajn montopintojn en la samaj altmontaraj ĉenoj kune kun siaj bulgaraj kolegoj-alpinistoj.

Pro la granda venko de la bulgara alpinismo — la sukcesplena grimpado al la himalaja montopinto Lho Tse, la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis la membrojn kaj la organizantojn de la bulgara alpinista ekspedicio «Himalajo — 81» per altaj ŝtataj ordenoj kaj titoloj.

Al novaj, pli altaj montosuproj, alpinistoj-herooj!

**ĤRISTO GEORGIEV**,  
merita majstro de l'sporto,  
ĉefredaktoro de la bulgara  
revuo «Turisto»